



# LA JUNIA VIVO



## MONATA ORGANO POR LA JUNULARO, INSTRUISTOJ, KAJ AMIKOJ DE LA JUNULARO

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: TJO-CENTRO, WEST-GRAFTDIJK, NEDERLANDO.  
ĜIRONUMERO 382363. • JARABONO 2,50 NED. GULD. AŬ EGALVALORO

### PRI LA NEDERLANDAJ VENTAKVOMUELILOJ KAJ LA INGVO DE LA MUELBRANĜOJ.



Kiam eksterlandanoj parolas pri Nederlando, ili preskaŭ ĉiam opinias, ke Nederlando estas lando nur de ventmueliloj, lignaj ŝuoj kaj tulipoj. Certe en neniu lando troviĝas tiom da ventmueliloj kiom en la malalta lando ĉe Norda Maro, sed estas bedaŭrinde, ke la plej multaj eksterlandanoj, kiuj vizitas Nederlandon, nur supraj rigardas la ventmuelilojn. Ĉu ili ne estas gigantaj konstruaĵoj?

Preskaŭ ne estas kompreneble, ke tiaj kolosoj, konstruitaj ofte laŭlonge de kanaletoj aŭ fosajoj, sur marĉa tero, dum tiom da jaroj, eĉ jarcentoj, povis resti starantaj sur tia tero.

Por tio necesis fari fortikan fundamenton. Se oni povus vidi la

fundamentojn de la ventmueliloj, oni tre certe pli atente rigardus la muelilojn. Ili antaŭe estis utilaj objektoj, precipe kiam la motor-kaj elektrotekniko ankoraŭ ne estis preskaŭ ĉiopovaj.

Pere de la ventakvomueliloj estis eble, ke la kamparanoj kaj terkulturistoj ĝustatempe povis rikolti la maturiĝintajn kreskaĵojn kaj la brutaro povis paŝtadi sin sur la verdaj herbejoj. La ventmueliloj formuelis aŭ forpumpis la troan pluvakvon. Bedaŭrinde, ke tiom da mueliloj ne plu funkcias aŭ estas malkonstruitaj kaj anstataŭigitaj per motoroj aŭ elektraj instalaĵoj. Pro tio la regiono ofte ne plu estas tiom pentrinda kiom en la tempo, kiam la mueliloj superregis la pejzaĝojn.

Ĉu estas pli bela vidaĵo ol ventmuelilo laŭlonge de kanaletoj aŭ fosadoj, en kiuj abunde kreskas la kano kaj floras la akvolilioj, kie kvakas la anasoj kaj bataladas la garoloj kaj la brutaro ĉarme aspektas kun la folioriĉaj salikoj?

Ĉu en Nederlando estas eĉ unu inter la junularo, kiu ne scias versaĵon, kiu aludas ventmuelilon kaj ĝian ĉirkaŭaĵon?

Sed estas fakto tre malmulte konata, ke la ventmueliloj havas ankaŭ lingvon. Ĝi ne estas lernebla per studlibroj, sed transiras de la patro-muelisto al la filo-muelisto. La brakoj parolas ĉi tiun lingvon, ili parolas pri ĝojo, malĝojo, bonstato, malbonstato k.t.p. Jen kelke da klarigoj:

Kiam la muelilo funkcias, la vento turnas la brakojn kontraŭen al la direkto de la montriloj de horloĝo kaj ĉiam, kiam la brako ankoraŭ ne atingas la vertikalan pozicion, ĝi nomiĝas „la alvenanta brako”. Tuj kiam ĝi preterpasas la vertikalan staton, ĝi nomiĝas „la foriranta brako”. Kiam la muelilo ne funkcias, ĝi plej ofte troviĝas en la stato, ke unu el la brakparoj estas vertikala kaj la alia horizontala, ĉi tiu pozicio nomiĝas „antaŭ la brusto”. Kiam fulmtondras aŭ ventegas, la muelisto metas la brakojn oblikvaj. Estas kvazaŭ ili parolus aŭ preĝus „Dio, indulgu nin”. Ĉi tiu pozicio nomiĝas „en la kruco”. La lingvo de gren-, seg- aŭ akvomuelilo estas diferenca, sed ambaŭ menciitaj pozicioj estas por ĉiuj la samaj. Kiam la muelisto deziras montri, ke estas ĝojo en la muelist-familio, pro tio, ke naskiĝis nova mondano aŭ edziĝos aŭ edziniĝos unu el la infanoj aŭ alvenis la dato, kiam li povas festi ekzemple 25-jaran geedziĝfeston k.t.p., li metas la brakojn en la alvenantan pozicion; tiel la brakoj montras, ke io alvenis. Kiam la muelisto deziras montri, ke en lia familio aŭ inter liaj geparencoj estas malĝojo pro tio, ke iu mortis, do iu foriris, li metas la brakojn en la forirantan pozicion. Kompreneble la muelilo troviĝas en la menciitaj pozicioj kiam ĝi ne funkcias. Dum unu jaro kaj ses semajnoj

la muelilo staras en la malĝoja pozicio, en la ĝoja pozicio ĝi staras ne pli longe ol du semajnojn.

Kiam la muelilo troviĝas apud trafikvojo kaj funebra procesio alproksimiĝas, plej ofte la muelisto metas la brakojn en la funebbran aŭ malĝojan pozicion, ĝis la procesio estos preterpasinta. Estas kvazaŭ la brakoj elparolus la lastan saluton al la mortinto kaj volus diri „ripozu pace”.

Kiam la muelisto metas la brakojn meze de la pozicioj „antaŭ la brusto” kaj „foriranta”, tio signifas, ke la muelilo estas difektita, do estas lama aŭ kripla kaj tio estas signo por la muelilriparisto, ke li devos veni por ripari. Se estas multe da laboro kaj la riparisto ne baldaŭ venos, la muelisto avertos aŭ venigos lin. Holandlingve oni diras: „la muelilo staras kripla”, t.e. ĝi troviĝas en ĉarpen-funebro. Atentu, ke per ĉi tiu pozicio la brakoj montras, ke io foriris, tial en la foriranta pozicio, sed iom pli alta ol la malĝoja pozicio.

Por la grenmueliloj la lastmenciita pozicio havas alian signifon. En la muelŝtonoj troviĝas sulkoj kaj de tempo al tempo ili devas esti pliakraĝataj. Kiam la muelilo estas en ĉi tiu stato, ĉi tio okazas, do la klientoj ne alportu grenon por mueli; ĉi tiu pozicio nomiĝas „oblikvangula”. Tuj kiam la ŝtonoj estas bonordaj, la muelisto funkciigas la muelilon kaj la klientoj povas alporti grenon muelotan.

Estas pli da pozicioj de la brakoj, sed ne ĉiuj estas la samaj en nia lando, do ankaŭ la brakoj de la mueliloj havas dialekton. Dum la pasintaj jarcentoj la muelilbrakoj multe da aferoj komunikis al diversaj personoj. Ofte okazis, ke diversaj personoj interkonsentis kun la muelisto por meti la muelilbrakojn en interkonsentita pozicio. Dum militoj ofte la brakoj anoncis la alproksimiĝon de la malamiko. Kompreneble antaŭe la militistoj interkonsentis kun la muelisto pri la pozicioj. Muelisto de alta grenmuelilo pere de la muelilbrakoj avertis amikan ŝtelĉasiston, kiam li estis en la kamparo por ŝtelĉasi kaj kiam proksimiĝas policisto aŭ ĉasgardisto.

Ankaŭ pere de la koloro de la veloj, kiuj troviĝas sur la brakoj de la mueliloj pasinttempe estis sciigataj diversaj ideoj. En la jaro 1795-a muelisto ricevis leteron de la nederlanda registaro, en kiu tiu protestis pri la koloro de la veloj. Ili estis oranĝkoloraj kaj la muelisto amis la oranĝan dinastion, kion la registaro ne toleris.

Fine io pri la rapideco, per kiu la muelilbrakoj zumadas tra la aero. La longeco de la plej multaj muelilbrakoj en nia regiono estas 28 metroj.

Kiam la vento forte blovas, la akso, sur kiu estas muntitaj la

brakoj, rotacias en minuto 25 fojojn, do 100 fojojn en minuto, preterpasas brakekstremaĵo difinitan punkton. Estas strange, sed kiam oni demandas al teknikisto difini la rapidecon de la brakoj, ne antaŭe kalkulitan, li preskaŭ ĉiam eraras. Ni faru la kalkulon:

La longeco de la brakoj estas 28 m, do  $3,14 \times 28$  m estas 87,92 m. La akso rotacias en minuto 25 fojojn.  $25 \times 87,92$  m estas 2198 m, ĉiuhore do  $60 \times 2198$  m = 131,88 km.

Per ĉi tiu kalkulo oni vidas, ke la rapideco de la muelilbrakoj estas tre granda kaj la akso rotacias ofte pli ol 25 fojojn, eĉ 30 fojojn. Oni nun bone povas kompreni, ke la brakoj devas esti solide konstruitaj. Ankaŭ la signifo de la esprimo „ricevi baton de muelilbrako” nun estas klara.

Leginte ĉi tiun artikolon, vi ne plu malatente preterpasos niajn-tipe nederlandajn ventmuelilojn.

E. van Walsum, delegito de U.E.A., Fop. Smitstraat 68, Alblasserdam (Z.H.), Nederlando.

Freilassing, Ob. Bayern.

## Karaj Geamikoj,

Kun entuziasmo mi ĉiam legas la rakontojn de gesamideanoj en „La Juna Vivo”. Tial ankaŭ mi volas ion rakonti pri mia hejma lando.

Freilassing estas urbeto en sudorienta Bavarujo. Ĝi kuŝas nur 7 kilometrojn de la mondfama urbo Salzburg kaj 32 kilometrojn de la urbeto Berchtesgaden, kiu situas 570 m super la marnivelo. Post promenado de kvin kilometroj (aŭ trajnveturo) preter la monto Jäll (2522 m) oni atingas la plej belan lagon de nia lando, la Königsee (Reĝlago). Ĝi estas 8 km longa, 1,2 km larĝa kaj 130 m profunda. Ŝipveturante sur ĝi, ni pasas oriente la Hagon-Montaron kun la belega kaj facile atingebla Jaunalm (1850 m). Okcidente leviĝas la rokoj de la plej alta monto: Watman (2714 m). Ni veturas preter Sankt Bartolome, kie estas preĝejo kaj gastejo. Multaj akvofaloj muĝante falas en la lagon.

Ĉe la fino de la lago oni povas fari belegan promenadon kaj en 10 minutoj oni atingas la lageton Obersee (Supra lago), kiu en la jaro 110-a apartiĝis de la Reĝlago por rokfalego. Potence levvas sin la rokoj de la monto (Ŝtona maro) kun la plej alta pinto Sönfeld (2655 m) kaj la Diablaj Kornoj (2361 m). Venu paradizo por naturamikoj!

Sed la montoj estas ne nur belaj, sed ankaŭ danĝeraj. Multaj tro riskemaj homoj ĉiujare perdas sian vivon. **Precepte la merkado**

de edelvejso estas danĝera. Ofte la floroj kreskas sur krutaj dek-livoj, inter neĝo kaj glacio. Ankaŭ danĝera estas la transiro de glaciejo sur la alta Kalter. La glacio havas multajn fendegojn, ofte kelkaj metrojn larĝajn, kaj centojn da metroj profundajn. Eĉ somere ili ofte estas kovritaj de ĵus falinta neĝo. Multaj ne-spertaj homoj tie mortas.

La plej vigla besto, kiu vivas sur la montoj, estas la ĉamo. Ĝi havas la grandecon de ŝafo kaj ĝi saltas trans la rokojn ĝis la pintoj. Por ĝi estas danĝeraj la vintro, kiam la neĝo ofte kuŝas 5 ĝis 6 metrojn alta, kaj la printempo, kiam la lavangoj tondre falas en la valojn.

Ni tre volonte konsilos kaj laŭeble akompanos gesamideanojn, kiuj venos al Freilassing.

G. Stumpfegger, Münchenerstr. 34, Freilassing Ob. Bayern, Germanujo.

### Li ne riskis tion.

La fama angla verkisto Shaw iam ricevis belan, parfumitan leteron de ĉarma amerika filmstelo. Ŝi skribis:

„Kara sinjoro Shaw, ĉu vi ne deziras edziĝi al mi? Kiel belega estos tio: niaj infanoj havos ĉiujn bonajn kaj belajn ecojn de ni ambaŭ. Ili estos same belaj kiel mi kaj same inteligentaj kiel vi.”

Shaw tuj respondis:

„Estimata fraŭlino, via propono estas tre alloga, tamen mi ne akceptas ĝin, ĉar la risko estas iomete tro granda. Imagu, ke niaj infanoj estus same belaj kiel mi kaj same inteligentaj kiel vi!!!”

### Cent Junulardomoj en Francujo.

(Vidu la artikolon „Franca Junulardomo” en la januara n-ro).

La „Franca Federacio de Junulardomoj” ampleksas proksimume 100 domojn. Tiu duonprivata organizo ricevas ŝtatan subvencion (Ministerio por Nacia Edukado), ekde 1945, sed malgraŭ la plialtigo de la prezoj, tiu monsumo bedaŭrinde ne ŝanĝiĝis.

Sur la regiona plano, domo dependas de „Inspekto por la Junularo”.

Administracie ĝi ne dependas de la lokaj instancoj, kiuj tamen ofte donas la necesigan sidejon. Oni ne povus krei „domon” sen la agema simpatio de la urba konsilantaro.

En Croix, du personoj konstante laboras por la domo: la estro, kiel instruisto, ricevas salajron de la ŝtato; la sub-estro ricevas sian rekte de la Federacio.

Krome domo povas ricevi „komenc-subvenciojn” por la kreo de nova fako.

Tiel funkciadas administracie kaj finance franca junulardomo.

Lucien Giloteaux, Croix, Francujo.


(Red. P. Korte, Schoolstr. 13, Vecndam, Ned.  
Centra Informejo: Einar Dahl, Uddevalla, Svedujo).

**Internacia Pedagogia Esperanto-Seminario antaŭ  
la 36-a U.K.**

En belega pejzaĝo inter la Walchen-Lago kaj Kochel-Lago en Super-Bavarujo, proks. 70 km de München, la Esperanto-instruistoj de tutmondo kunvenos en Internacia Pedagogia Esperanto-Seminario.

1. Daŭro: 10 tagoj de 26/7-4/8 '51.

2. Kostoj: por loĝejo, manĝaĵoj kaj dormejo en Georg. v. Vollmar-Schule, Libera Altlernejo por Politika kaj Socia Demokratio, en kastelo Aspenstein en



Kochel ĉe Lago, nur po 6.— Germ. Mark. tage.

3. La nombro de la partoprenontoj estos limigita je 35.

4. Ĝeneralaj programpunktoj: 1. Esperanto kaj lernejo. — 2. Esperanto kaj la fakasocioj de ĝeinstruistoj. — 3. Esperanto, servilo por la pedagogia scienco. — 4. La enkonduko de Esperanto en popol-, mezgrad- kaj altlernejojn. — 5. Scienca fakorgano pedagogia. — 6. Porinfana gazeto „La Juna Vivo”. — 7. Internacia kunlaborado de ĝeinstruistoj por Esperanto. — 8. La interrilatoj kun registaraj oficoj kiel ministerioj en la unuopaj landoj. — 9. Internacia infan-interŝanĝo per Esperanto. 10. Organizaciaj demandoj de ILEI (Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj).

5. Kondiĉoj por partoprenontoj: Nur bonkvalitaj Esperantistoj povos partopreni, ĉar oni konferencos nur Esperante.

6. Pagoj rekte al la organizanto: Esperanto-Vereinigung Deutscher Lehrer, (13a) Kitzingen I, Germanujo, per nacia mono aŭ al poŝtĉeka konto 72.694, Karl Kröber, poŝtĉekoficejo Nürnberg.

7. Se gekolegoj pro maloportunaj feriaj tempoj povos partopreni nur ses tagojn, ili bonvolu anonci tion. Ankaŭ ili pagu nur po 6.— M. tage (En la sumo estas jam enkalkulita la ĝenerala seminaria kotizo).

8. Kiu intencas teni referaton pri unu el la 10 programtemoj, bonvolu anoncisan pretecon al la okaziganto.

9. Aliĝoj tujaj (vidu la limigitan nombron da partoprenontoj) petatataj rekte al la organizanto: Esp.-Vereinigung Deutscher Lehrer, (13a) Kitzingen I, Germanujo.

**Vintra renkontiĝo en Francaj Alpoj.**

La ski-renkontiĝo en Méribel-les-Allues (1600 m, Francaj Alpoj), organizita de G.E.E. (Asocio de francaj esperantistaj edukistoj), bonege sukcesis. Ĝin partoprenis 10 esperantistoj, kiuj ĝuis belegan semajnon.

La manĝaĵoj estis abundaj kaj variaj kaj neniu plendis pri la modesta loĝado. La vesperojn oni plenigis per perfektigaj ekzercoj, paroladoj, diskutoj, projekcioj, ludoj, kantoj.

Nova renkontiĝo estas antaŭvidita por la proksima sezono, kun iom pli da komforto. Por helpi en la plibonigo de la organizado, eventualaj interesatoj jam nun interrilatu kun s-ro E. Bidoit, Instruisto, Cours Complémentaire, Suippes (Marne), Francujo, por konigi siajn dezirojn.

Invado de nederlandaj p.m. Ni ricevis ilin de Jacob Vermeulen, A. Zoutewelle, Harry Voskamp, Gerard Geldhoff, Hans Bakker, A. v. d. Sande, Hein de Haan, Lies v. Noorloos, Jacques v. Veen, Freddy v. Breemen, Greetje Dekkers, Han Visser, Daan v. Kampen (ĉiuj en Bergen op Zoom). Ili petis al ni p.m. el Finnlando, Svisujo, Usono, Islando, Italujo, Norvegujo, Afriko. Bedaŭrinde ni ne povas helpi ilin sen via helpo.

Ili sendis belajn nederlandajn ekzemplerojn. Kiu volas interŝanĝi?

Ni ricevis ankaŭ belajn p.m. el Aŭstrujo, de amiko Podrepschek, novan sendaĵon de amiko Titon el Francujo kaj de f-ino Mouvais el Angers (Francujo).

### Karaj Lernejanoj,

Certe ĉi tiu numero de „La Juna Vivo” ne tre plaĉos al vi. Ĝi ne estas tiom bela, kiom la antaŭa, ĉu?

Ĉu vi dezirus ricevi ĉiam tiom belan gazeton? Nu, tio dependas de vi! Kompreneble multaj bildoj kostas multan monon. Kaj ..... multan monon ni ne havas. Sed ni povas akiri ĝin, per multaj, multaj abonantoj.

Do, jen via tasko: Varbu abonantojn kaj faru verkaĵojn por via propra, internacia gazeto. Ne forgesu ankaŭ desegni, se vi tion povas.

Nur kiam vi mem ĉion verkos, „La Juna Vivo” tute interesos vin!


Se ni antaŭ la 1-a de julio estos certaj pri multaj abonoj (almenaŭ 2000), tiam en ĉiu numero de la lerneja gazeto en la nova jaro estos koloraj bildoj. Sed ..... se ne estos sufiĉe da abonantoj, la lerneja gazeto verŝajne tute malaperos! Do — kion vi faros???

Multaj lernejoj havas propran gazeton. Traduku el ĝi en Esperanton. Via instruist(in)o certe helpos vin. Sendu la materialon al „La Juna Vivo” (T.J.O.-Centro, West-Graftdijk). La infanoj de la tuta mondo legos ĝin kaj ankaŭ ili ekverkos.

La knabinoj en la Secondary Modern School en Birmingham jam faras lernejan gazeton tute en Esperanto, kun bildoj. Bonege! Ĉu vi sendas ĝin ankaŭ al aliaj landoj? De Michael Walker kaj Peter Whalley, ambaŭ de la Elliston Sec. Mod. School en Cleethorpes (Britujo) ni ricevis verkaĵojn. Dankon! Kiuj sekvos?

## NIA VERKILO.

Verku mallongajn historiojn pri ĉi tiuj du bildoj.



1.



2.

Ĉu vi volas sendi al mi la rakontojn?  
Mian adreson vi scias, ĉu ne?

### Nia Klubo.

Ni havas klubon, kiu komencas je la sesa horo kaj tridek minutoj, ĉiulunde.

Ni ludas biliardon, ŝakludon, kartludojn k.t.p. Ni povas ankaŭ desegni aŭ legi aŭ skribi leterojn.

Ni devas pagi unu pencon en la kluban kason pro ĉiu ludo. Aŭ se ni pagas tri pencojn en la kluban kason, ni povas senpage ludi ĉiun ajn ludon.

Nia instruisto instruas nin pri ludoj, kiujn ni ne komprenas.  
Ni ĉiam parolas Esperanton.

Michael Walker (13-j.), Elliston County Sec. School, Cleethorpe, Britujo.

### Bovino en mia domo!

Por gvidi la bovinojn al la stalo necesas en nia farmdomo pasi la enirpordon de nia hejmo.

Iun tagon mi pelis ilin al la stalo. Sed la pordo de nia domo estis malfermita kaj la bovino eniris!


Ĝi venis antaŭ spegulŝrankon, kiu spegulis ĝian bildon. Ĝi sendube kredis, ke tie staras alia bovino kaj eklekis la spegulon.

En tiu momento mi alvenis. Mi kondukis ĝin eksteren. Feliĉe, ke ĝi nenion frakasis per siaj kornoj!

Verkita (laŭ la Freinet-tekniko) de F. Fort, Francujo.



## Striks, la Flameo (daŭrigo).



Nun mi povas rakonti ankaŭ ion pri mia nutraĵo. Mi preferas musojn. Mi posedas akran bekon kaj tre akrajn ungojn, per kiuj mi bone povas kapti ilin.

Mi formanĝas la musojn kun karno kaj

osto. Sed ..... ĉar la musharoj ne povas resti en mia stomako, mi faras de ili belan pilketon kaj elkraĉas ĝin.

Mi kaptas ne kolombojn, sed volonte ratojn. Mi ankaŭ malgrandajn birdojn ne kaptas.

Ĉu vi nun opinias, ke mi estas malutila besto?

Kial la homoj ĉiam forpelas min? Mi faras ĉion bonan por ili.

Ĉu vi scias, kio estas stranga? Ankaŭ la bestoj malamas min.

Se mi dumtage dormas kaj malgrandaj birdoj vidas min, ili ekkrias kaj mokas min.

La homoj estas malsaĝaj, superstiĉaj individuoj, sed la bestoj povas scii pli bone .....

Mi ne plu plendos!

Malgraŭ ĉio mi estas grava besto!

El la lerneja gazeto de Edam, Ned.

## Patrina Amo.

Sinjoro, ie en Nederlando, havis hundon. La hundo ricevis idojn. Sed kio okazis? Oni forprenis la idojn de la patrino. Kompreneble tio ne plaĉis al la hundo!

La sekvintan jaron la sama hundo ree ricevis idojn. Sed — ĝi havis tre bonan memoron! Ĝi fosis grandan, profundan kavon en la tero, kun longa koridoro. En tiu kavo ĝi kaŝis siajn idojn.

Ruza patrino, ĉu ne?

## Ruzaj enigmoj.

1. Kiam oni skribas la vorton muskaptilo per kvar literoj?
2. En stalo estas tri azenoj. Kiu estas la plej saĝa?

## Helpanto!

Venis printempo. Vinberkulturistoj iris por fosi la vinberejojn. Ili invitis ankaŭ la merlon por helpi.

„Mi nun ne povas helpi, mi konstruas neston”, ĝi diris.

Venis tempo por tranĉi la vinberejojn.

Ekiris la vinistoj kaj denove invitis la merlon.

Ĝi respondis: „Mi ne povas helpi: nun mi demetas ovojn.”

Venis tempo por fosi la vinberejojn. Ekiris la fosistoj kaj invitis la merlon: „Nu, merlo, ni fosu!”

„Mi ne povas fosi”, ĝi diris. „Nun mi kovas.”

Venis tempo por ligado. Ekiris la ligistoj kaj invitis la merlon:

„Nu, merlo, ni ligu!”

„Mi ne povas helpi”, respondis la merlo. „Malgrandaj estas miaj idoj.”

La vinberoj maturiĝis. Oni ekiris por rikolti.

„Nu, merlo, ni rikoltu la vinberojn!” invitis la vinberkulturistoj.

„Jen nun! Jen nun!” ĝoje ekkriis la merlo. „Atendu, invitu ankaŭ miajn infanojn por helpi!”

Marvel, Bulgarujo.

## Amiko sur breto.

Sur la breto, jen amiko,  
Kiu diras: „Tik, tak, tiko”.  
Multajn fojojn homaranoj  
Ekrigardas al la manoj  
De la bona amiketo,  
Kiu staras sur la breto.

Sur vizaĝo, ronda, pala,  
Estas ringo numerala.  
Jen ciferoj, 1, 2,  
3, 4, 5 kaj tiel plu.  
Dek du horoj ili estas  
Kaj en sia loko restas.

Montras al ciferoj tiuj  
Du manetoj nigraj, kiuj  
Sur vizaĝo sin trovadas,  
Nokte, tage tre paradas.  
Longa mano pli rapidas,  
Tion ĉiu homo vidas.

Ronde iras ĉiu mano.  
Ili diras al infano,  
Kiu en la lito restas:  
„Jen, kioma horo estas!”  
Do, horloĝo sur la breto  
Estas vera amiketo.

Nenjo Rimanto (Kopirajto rezervita).

## Kiam alvenis la bela printempo .....

Kiam la vintro finiĝis, alvenis la ĝojiga printempo. Ĝin anoncas la modestaj kampfloroj kaj birdoj, kiuj revenis al ni el varmaj landoj.

La tagoj estas jam multe pli longaj kaj la oraj sunradioj agrable varmigas la teron. Fortaj ventoj kaj pluvoj forportis jam la lastajn restojn de la neĝo. Nun ili silentas kaj nur mildaj ventetoj blovas tra la kampoj. La arboj ankoraŭ ne surmetis sian verdan ornamon, sed sur la herbejoj kaj en la arbaroj la delikataj unuaj floroj jam salutas la sunon.

La tero elspiras fortan odoron. En ĉiu arbo ni aŭdas la gajajn voĉojn de la kantbirdoj.

Ni tre volonte forkuras el la hejmo por pilkludi sur la ludejoj, sur vastaj kampoj kaj placoj ekster la urbo. Forta sopiro fortiras nin ankaŭ el la lernejo. Nun ni pli ŝatas ludi en la sunradioj ol sidi en klasoĉambro. Ĉar la printempo estas la plej ĉarma sezono de la jaro kaj ni volas ĝin plene ĝui. Sed niaj taskoj nin retenas: ni devas lerni, diligente kaj fervore, por esti iam taŭgaj kaj bravaj civitanoj.

Sinjoro instruisto promesis al ni aranĝi komunan printempan ekskurson al la plej proksima ĉirkaŭaĵo. Ni tre ĝojas kaj malpacience atendas tiun tagon.

El la lernolibro „Kompleta kurso de Esperanto”, verkita de prof. Sygnarsky, Krakowo, Polujo.

### Danĝera akvo.

Jim kaj Joe veturis vagonare. Ili soifis, sed ili povis ricevi nur mineralakvon. Ĉar ili tre soifis, ili aĉetis du botelojn da ĝi.

Jim malfermis unu botelon, por gustumi. En tiu momento la vagonaro ĝuste enveturis tunelon.

Joe demandis: „Ĉu ĝi bongustas?”

Jim respondis: „Ne trinku! Mi estas tute blinda pro ĝi!”

H. Ring, Kolonjo, Germanujo.

### Ĉu danĝera?

La muŝo estas insekto kun ses piedoj kaj ĝi estas pli danĝera ol leono. Sed tamen estas pli bone, ke muŝo mordas vin ol leono!

Joĉjo.

### La saĝa koko.

Freĉjo iris kun sia patro al la kamparo, por pasigi tie sian ferion.

„Kial la koko ĉiam krias, paĉjo?”

„La koko, mia knabo, ĉiam krias, kiam homo diras mensogon”.

„Sed kial ĝi krias je la tria en la nokto?”

„Ĉar oni tiam presadas la matenjurnalon, Freĉjo.”

## KONKURSRUBRIKO.

### Novaj konkursoj:


II. (Ĝis dujara lernado): Devas, diras, dubas, faras, gajnas, ĝenas, havas, laŭdas, ludas, povas, rajtas, taŭgas, vidas, volas.

- a. Kiu paciencon ....., tiu bonan verkon .....
- b. Kiu amikon ne ....., tiu respondi ja .....
- c. Kiu malbonaĵon ....., tiu malamikon .....
- d. Kiu bone paroli ....., tiu bone paroli .....
- e. Kiu pri futbalo ne ....., tiu per piedpilko .....
- f. Kiu per bono rajton ....., tiu per laŭdo .....

Metu en la liston verboparojn laŭ vokalsonoj kaj senco.

Ekzemple: Kiu paciencon **havas**, tiu bonan verkon **faras**.

Sendu vian provon antaŭ la 1-a de majo al: s-ro N. H. Smith, Grange Farm, Upper Halliford, Shepperton, Anglujo.



7-a Internacia  
Junular-Kunveno  
en Haarlem, Nederlando  
(26/7—2/8 1951)

Adr. Organiza Komitato:  
M. Tinxgracht 10, Edam,  
Nederlando.

La kongreskomitato deziras atentigi vin pri tri gravaj aferoj:

1. Ĝis nun jam 250 partoprenontoj anoncis sin, aŭ petis informojn.

Sed ..... kie restas la aliĝiloj? Ne forgesu, ke nur tiuj partoprenos, kies aliĝilojn ni ricevis. La tempo urĝas kaj ni absolute ne havos pli ol 300 lokojn, do ni povas antaŭdiri, ke la „fermdato” por aliĝiloj venos pli baldaŭ ol vi supozas. Rapidu!

2. Kelke da amikoj volonte partoprenus la IJKn, sed bedaŭrinde ili estas tre malriĉaj.

Ĝis nun ni ricevis tri donacojn. Ni bezonos multajn! Tial ni urĝe petas: sendu la vian, se necese malgrandan. Vi helpos viajn gemikojn!

3. La ekskursoj dum la Haarlema Kongreso estos surprizo por ĉiuj, eĉ por la nederlandanoj. Ni vojaĝos tri tagojn per belegaj

luksaj aŭtobusoj al tipaj nederlandaj urbetoj, ŝipveturos tra la malnova urbo Amsterdamo kaj trans la Ysellago.

Mallonge ..... vi ĝuos kiel neniam. Kaj vi foriros kun la belega penso, ke vi akiris pli ol 300 novajn geamikojn!

Do denove: Rapidu sendi al ni viajn aliĝilojn!

**Por la britaj partoprenantoj:** En la antaŭa n-ro staris, ke f-ino Rees gvidos karavonon. Tio ne okazos. Ŝi transdonis tiun taskon al: **S-ro L. Symes, Quains, Minchinhampton, Glos.** Interesatoj do bonvolu kiom eble plej baldaŭ interrili kun s-ro Symes.

**Francaj partoprenantoj** interrillatu pri la IJK-aranĝoj (vojaĝo, pasporto, mono k.t.p.) kun s-ro Omont, 66 rue Albert Joly, Versailles (S. et O.)

**Por ĉiuj:** Se vi petas informojn, aŭ iun ajn sciigon pri la I.J.K., bonvolu aldoni respondkuponon (aŭ, enlande, poŝtmarkon) por la respondo.

**Atentu bone:** Por la postkunveno en 't Gooi (vidu la informojn en la antaŭa n-ro) oni post la **15-a de aprilo ne plu povos anonci sin.** Interesatoj do sendu sian aliĝilon **antaŭ** tiu dato al TJO-Centro, West-Grafdijk, Nederlando. Nederlandanoj samtempe pagu la garantian sumon de 5 guld.

**Unua listo de partoprenantoj:** **El Aŭstrujo:** 1. J. Bozič (Ebendorf). **El Britujo:** 2. F-ino C. Biles, 3. F-ino V. King, 12. F-ino M. Hockey, 14. F-ino B. Owen, 15. F-ino I. Robins, 16. F-ino H. Dennely, 17. F-ino O. Evans, 18. F-ino M. Kilgour, 19. F-ino E. R. Lloyd, 20. F-ino Gr. M. Mc. Gann, 21. F-ino S. Wildman, 22. F-ino A. Wilson, 23. F-ino D. Ashford, 24. F-ino S. Brugham, 25. F-ino J. Brooks, 26. F-ino A. Buckingham, 27. F-ino D. Crowallader, 28. F-ino A. Chatterton, 29. F-ino P. Gill, 30. F-ino L. Grove, 31. F-ino M. Jackson, 32. F-ino P. Moore, 33. F-ino G. Hummery, 34. F-ino M. Nathan, 35. F-ino G. Perrins, 36. F-ino V. Price, 37. F-ino P. Smith, 38. D. Sweetman, 39. J. Sparrono, 40. F-ino I. Talbatt, 41. Fr. Tanner, 42. P. Trinder, 43. P. Vernon, 44. E. Viles, 45. C. Willis, 46. I. Wright (ĉiuj f-inoj el Birmingham), 13. F-ino P. Mayhew (Luton). **El Germanujo:** 4. M. Schmidt (Konstanz), 5. J. Linnartz (Berrenrath b. Köln), 6. H. Logemann (Bremen), 8. K. Eberspracher (Zell), 10. s-ino L. Schmidt, 11. infano K. Schmidt (ambaŭ el Hamburg). **El Nederlando:** 7. A. Balkenende (Leidsendam), 9. Helmi Veldhuyzen (Delft), 47. F-ino N. Kool (West-Grafdijk), 48. F-ino A. Kaagman, 49-50. Ges-roj Geurts (ĉiuj el Edam), 51. F-ino L. Ligtermoet (Bilthoven).

**Unua donacisto:** K. E. en Zell (Germanujo): 5 D.M.; M. S. en Konstanz (Germ.): 5 D.M.; L. L. en Bilthoven (Ned.): 5.— guld.

**Respondoj de la ruzaj enigmoj:** 1. Kato. — 2. La plej malgranda el ili. La aliaj ja estas pli grandaj azenoj.

## T.J.O.-RUBRIKO.

(Sekretariino: *Helmi Veldhuyzen, Hof v. Delftlaan 79, Delft, Nederlando*).



En niaj vicoj ĉiam troviĝas kelkaj konstantaj gelaborantoj. En tiu rilate ni certe devas nomi du samideaninojn, kiuj faris kaj faras multan propagandon, precipe en instruistaj rondoj. Tiuj estas f-ino Nixon en Britujo kaj f-ino Dedieu en Francujo. En ĉi tiu loko dankvorto certe estas ĝusta. Niaj samideaninoj estas veraj ekzemploj por ĉiuj. Ni konsilas al ĉiu imitadi ilin kaj ni deziras, ke tiuj havos same brilajn sukcesojn!

La 10-an de decembro en 1950 stariĝis la „Regiona Ligo Baden de la germana sekcio de TJO”. Prezidanto estas nia fervora, nelacigebla samideano, Michel Schmidt. Ni esperas doni en venonta numero pli da detaloj.

## SKOLTA RUBRIKO.



**Britujo:** Dum la lasta semajno de marto ĉijara ĉiu skolto en Britujo faros sian eblon por gajni almenaŭ unu ŝilingon por la subtenado de la Skolta Movado en sia lando. Ni nomas tiun semajnon „Bob-a-job week” (ŝilingo-portasko semajno). Per reklamado k.t.p. oni informas la loĝantaron, ke la skoltoj estas pretaj fari servojn en aŭ ekster la hejmoj por ĉiu, kiu donos unu ŝilingon al la skolta kaso.

En la pasintaj du jaroj oni havas grandan sukceson je tiuj „bob-a-job”-semajnoj, ĉar la skoltoj ne nur gajnis po unu ŝil. por la centra kaso, sed eĉ pli multe por la graflandaj, distriktaj kaj grupaj kasoj. Fakte multaj skoltoj tiom entuziasme laboris, ke ili gajnis po pli ol unu funton sterlingan.

Tre imitinda afero por niaj TJO-anoj. Ĉiuj grupanoj kaj izolitoj povus gajni unu ŝilingon por la TJO-kaso, mi opinias.

Kion opinias la estraro? Ĝi estas taŭga temo por la laborkunsido dum la IJK en Haarlem.

L. Symes, (Brita) skoltkomisaro.

**Francujo:** Antaŭ 15 jaroj ekzistis en Parizo sendependa grupo, nomita „Hirundoj de la Paco”. Poste membroj de tiu grupo starigis aliajn grupojn en la sudorienta kaj okcidenta partoj de Francujo. Tiel naskiĝis la „Federacio de neŭtralaj geskoltoj”.

Post Pasko de la antaŭa jaro la Hirundoj de la Paco eklernis Esperanton kaj la grupo de tiu federacio en Marseille (sudorienta Francujo) nun publikigas kurson de Esperanto en sia regiona gazeto.

La kialo de tiom grava interesiĝo pri nia afero estas, ke tiu federacio volas fari ĉion, por ke la homoj interkompreniĝu. Kaj Esperanto ŝajnas al ĝiaj membroj unu el la plej taŭgaj iloj por naski la amon inter la homoj kaj sekve la pacon.

Nia lingvo certe disvastiĝos, dank' al la klopodoj de la membroj de tiu federacio de neŭtralaj geskoltoj.

J. Texier, instruanto ĉe la Hirundoj.

## RICEVITAJ ESPERANTAĴOJ.

**Enigmo-kajero**, n-ro 1. — 8-p. broŝureto, enhavanta diversspecajn enigmojn. Abonprezo 6 resp. kup. por 6 n-roj. Eld. W. Dickel, Postfach, Dortmund-Wellinghofen, Germanujo.

**Kiso de la Reĝino**, de I. F. Najvin, el la rusa lingvo tradukita de D. Staritsky. N-ro 10 en la Epoko-Serio, eldonita de The Esperanto-Publishing Company Ltd. (Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo). 188-p. broŝ. libro, prezo 3 ŝil. plus 3 p. por la afranko. — Verkajo pri la interesaj aventuroj de rusa inĝeniero en la Belga Kongo, kie oni konstruas fervojon, post la unua mondmilito. — La libro estas mendebila ankaŭ ĉe TJO-libroservo.

**Historio de Yukava Teorio**. 25-p. broŝ. libreto, verkita kaj eldonita de Esperanto-Rondo en la Naturscienca Fakultato de Osaka Universitato, Osaka, Japanujo. Prezo 0,11 dol. — Verketo pri la mezonteorio de prof. H. Yukawa, kiu en 1949 akiris la nobelpremion. — La libreto estas mendebila ĉe Japana Esp. Instituto, Tokio, Honĝo-Motomati, 1-13.

**Urbo Bela Horizonte**: bela: 36-p. ilustrita libro, mendebila kontraŭ 5 resp. kup. ĉe Brazila Esperanto-Ligo, Praca de República 54-1, Rio de Janeiro, Brazilo.

**La Nova Erao**, de M. A. Teixeira de Freitas; 26-p. kartonita libro, eldonita de la Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko. Prezo 5 resp. kup.; mendebila ĉe Brazila Esperanto-Ligo, Praca de República 54-12, Rio de Janeiro, Brazilo. (Parolado de la prezidanto de la Brazila Societo de Statistiko pri la graveco de internacia lingvo por internacia paco kaj la speciala taŭgeco de Esperanto por tio).

**Por iu pli bona mondo**: Kolekto da dokumentoj, dediĉita de la Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko al la XXII-a Internacia Kongreso de Katolikaj Esperantistoj, okazinta en Romo en la Sankta Jaro 1950-a. — Bela, grandformata 31-p. libro kartonita. Prezo ne indikita.

**Retoriko, kun aparta konsidero al Esperanta Parolarto**. — 215-p. broŝurita libro, originale verkita de prof. d-ro Ivo Lapenna, eldonita de la aŭtoro. Prezo 500 fr.fr. (10 ŝil., 5,50 guld.) plus 10% por la sendkostoj. La libro estas mendebila ĉe la aŭtoro. (Paris XVI, 33 Leconte de Lisle) aŭ ĉe la TJO-libro-servo (M. Tinxgracht 10, Edam, Ned.). — Tre rekomendinda verko, kiun la aŭtoro dediĉis al la Esperantista junularo, sed kiu certe estas interesa, instrua kaj utila por ĉiuj esperantistoj kaj precipe por tiuj, kiuj estas devigataj paroli publike (ne maloftajo en Esperantujo!).

**La vojo al daŭra paco kaj ĝenerala prospero**. 4-p. broŝuro pri la 7-a Internacia Kongreso por Progresigo de Tervalora Impostado kaj Libera Komercio, senpage havebla ĉe 4 Great Smith Street, London S.W. I, Anglujo.

**Moderna Esperanto:** Presita folio kun cirkulero pri nova Esperanta ortografio; Eld. N. H. Divall, 24 Priory Road, Hastings, Sussex, Anglujo.

# KORESPONDADRESOJ

Ĉiu abonanto aŭ grupo unufoje jare rajtas enpresigi senpagan, dulinian korespondadreson.

**Bulgarujo:** Stojan Velicov Georgiev, str. „Car Samuil” 123, Burgas (21-jara) dez. kor., interŝ. pm. k.pk., revuojn, fotojn, ktp. k.l.t.m.

**Nikola Ivanov Karakondakov,** str. „Praga” 23, Assenovgrad, dez. kor. pri div. temoj kaj interŝ. il. pk. kun la tuta mondo.

**Ĉeĥoslovakujo:** 21-j. instruisto, s-ro Mirek Vacek, Sporilou 1073, Praha XIII, serĉas gekorespondantojn por siaj kursanoj (komenc. k. progr.).

**Franco:** S-ro Bouème Gerard, 2bis rue Montbauron, Versailles (S et O) dez. kor. kun eksterlandanoj.

22-j. junulo, kiu ĉeestos en Haarlem, volonte korespondus kun nederlandanoj. L. Giloteeaux, Dépendence Mairie, Croix (Nord).

S-ro Bertin Titon, 71 rue de la Convention, Paris, dez. interŝ. poŝtm. k. gazetojn kun gesamideanoj en ĉiuj landoj. Resp. garantiata.

F-ino R. Correy (27-j.), 20 rue Bersot, Besançon, dez. kor. kun la tuta mondo. (Ŝi ĉeestos en Haarlem kaj München).

**Germanujo:** La Hamburga Esperanto-Junularo aranĝos en aprilo '51 letervesperon. Skribu al Maximilian Frense, Thörlweg 8 ptr., Hamburg-Harburg.

**Hispanujo:** Pedro Mates Gil (22-j.), Juegos Flora lcs. 141-1°, Barcelona, dez. interŝ. revuojn kaj let. pri ateismo kaj meĥanismo k.l.t.m.

**Nederlando:** 9 geknaboj (10-13-j.) dez. kor. kun samaĝuloj per simplaj leteretoj k. poŝtk. Adr.: P. Cléy, Lingestr. 16 B, Groningen.

**Svedujo:** 25 gelernantoj en Laplando dez. kor. k.l.t.m. per bildkartoj. Skribu al F-ino Eden Isaksson, Koskullskeeler.

**Usono:** Lernantoj 13-15-j. dez. kor. kun samaĝuloj. Adresu al: S-ro Robert Alberg, Eastern Jr., High School, Lynn, Mass.

## Ĝeneralaj informoj.

**Internaciaj Someraj Kursoj** en Soesterberg, Nederlando (27/7-2/8'51). Informojn kaj senpagan prospekton oni povas ricevi de s-ro C. B. Zondervan, Sweelinkstr. 2, Deventer, Nederlando.

**Internaciaj FERIAJ Kursoj** en Helsingør, Danujo (22/7-29/7 '51). Informojn donas s-ro L. Friis, Ingemannsvej 9, Aabyhøj, Danujo.

**Radio Roma.** — La unuan vendredon de la monato: respondoj al geaŭskultantoj pri la „Dia Komedio” de Dante, Alighiere kaj aliaj temoj. La duan kaj kvaran vendredojn: komentado de unuopa kanto de la Dia Komedio. Prelegisto: Prof. Vincenzo Musella. Nepre skribu multnombre al la stacio por apogi la elsendojn. Adreso: Radio Roma — Esperanto, Via Vittorio Veneto 56, Roma, Italujo.